

Brazila Esperantisto

OFICIALA ORGANO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO

98-a jaro
n-ro 330
jan/mar 2006

Libeks

La unua esperantisto
loginta en Brazilo

Kampino 2006

Gasturbo de la 41-a
Brazila Kongreso
de Esperanto

Semajno Suda Stelaro

Lingva festivalo, filatela ekspozicio
kaj lanço de stampilo

ISSN 0006-9477



9770006 947005 00005

41-a Brazila Kongreso de Esperanto

26-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso

Campinas-SP 15 - 19 de julio 2006



Temo:

Esperanto kiel ilo por homa disvolviĝo



Internacia Simpozio

“La lokaj Esperanto-grupoj kiel komunuma socia kapitalo”

Infana Kongreseto



Organizado:



Kultura Centro de Esperanto
kultura@esperanto.cc
(19) 3287-8228



Brazila Esperanto-Ligo
www.esperanto.org.br
(61) 3226-1298



Amerika Komisiono
de UEA
www.ameriko.org

Aŭspicio:



Universala Esperanto-Asocio
www.uea.org



Semajno Suda Stelaro



Kiel antaŭaranĝo al la centjariĝo de la unua klubo de Esperanto en Brazilo, esperantistoj el urbo Kampino okazigis lingvan festivalon en Unicamp - unu el la

plej prestiĝaj brazilaj universitatoj. La evento daŭris unu semajnon kaj konsistis el pluraj programeroj.

10

Kampino 2006

Kampino, la ĉijara gasturbo de la 41a Brazila Kongreso de Esperanto, ankaŭ estas la centjara gastiganto de la unua grupo de esperantistoj en Brazilo. Legu en la Dua Cirkulero kaj tra la paĝoj de la revuo kio atendas vin tie en julio.



14

Unua Esperantisto loĝinta en Brazilo

Libeks

Lorenz

Dum multaj jaroj oni konsideris la ĉeĥon Francisco Valdomiro Lorenz la pioniro de Esperanto en Brazilo. Esploroj faritaj de Pekim Tenório Vaz tamen puŝas la titolon al alia alilandano, nome Rudolfs G. Libeks el Latvio.

20

Unua vico (sidantaj): João Keating, la portugalo vicgrafo de S. Valentim, Couto Fernandes kaj Everardo Backheuser. Dua vico: Paiva Araújo, Lauriano Trinas, Mello e Souza, Leonel Gonzaga kaj Caetano Júnior. Tria vico: Severino Freitas, Olegário Azevedo, Honório Leal, Reinaldo Geyer kaj Hernani Mendes.

Enhavo

Ĉefartikolo

Festu ankaŭ vi!.....04

Komuniko

Revuo Brazila Esperantisto revenas plenvigle!09

Kampino 2006

Semajno Suda Stelaro 10

Filatela ekspozicio kaj novaj kursoj de Esperanto..... 11

Esperanto en Unicamp: lastatempaj atingoj12

La Idiomo sen Patrio 13

Dua cirkulero 14

Kampino: gasturbo de la ĉijara BKE.....15

Jen la 26-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso 16

Infana Kongreseto dum la 41a BKE en Kampino 17

Literaturo

Destino18

Historie

El la pasinto, tutkore19

Eseo

Rudolfs Libek, la unua esperantisto loĝinta en Brazilo.....20

HUMURE.....22

Destaque (Suplemento em português)

Revista Brazila Esperantisto volta a todo vapor!..... 05

Resumo das principais notícias do mundo esperantista..... 06

Resumo das principais notícias publicadas nesta edição..... 07

Chave de pronúncia..... 08

Kunfestu ankaŭ vi!

Karaj Legantoj,

Jen vi havas bonajn motivojn por kunfesti: la centjariĝon de la unua grupo de Esperanto en Brazilo kaj la reapero de via ŝatata revuo. **Brazila Esperantisto**, kiu pro financaj kialoj devis iom vintrumi, revenas plenvigle kaj kun kelkaj novaĵoj. La plej evidentaj estas la nova grafikaranĝo kaj formato. Vi konstato, ke ankaŭ la interno kolore malbuntigis, sed klopodo okazas niaflanke por ke ĝi enhave pli kaj pli buntigu kaj rekonkeru tiun altnivelan stadion al kie portis ĝin la kompetentaj antaŭaj redaktaj teamoj.

La numero kiun nun vi tenas en viaj manoj estas rezulto de laŭdinda partnereco sigelita inter BEL kaj la TV-kabla servorganizo UP (legu komunikon sur p. 9). Tial de nun reklamo sur la lasta kovrilo de la revuo memorigos vin pri tiu efika kaj apoginda partnereco. Unio Planeda subtenos la presadon ne nur de via ŝatata revuo, sed ankaŭ tiun de BEJO, nome *Momenton!*. Oni certe sin demandas kiel tio eblas. La respondo venas el BEL-estraraj gvidantoj mem: ni devas apogi

indajn projektojn por ke bonintencaj idealistoj reciproke apogu nian aferon.

Ĉar de nun **Brazila Esperantisto** estos dissendata ne nur al legemaj samideanoj, sed ankaŭ al multaj neesperantistoj, portugala suplemento estis elpensita cele provizi tiun novan publikon. Per tiu rimedo viaj ŝatataj rubrikaj resume envenos centojn, espereble milojn, da domoj tra la tuta Brazilo. Scivolemaj homoj laŭvole eĉ povos riski legi ilin esperante per helpo de ŝlosila prononctabelo trovebla fine de la suplemento.

Kiel konstateblas, tiu ĉi numero iom prokraste atingas vin. La samo ankaŭ okazos kun la junia numero kiu aperos en aŭgusto pro la ĉijara BKE. Post tio la aperritmo de la revuo reguliĝos. Nun estas via vico sendi al nia redaktejo viajn reagojn, sugestojn, eventualajn kritikojn kaj ĉefe abundon da kontribuajtoj.

Bonan legandon kaj ĝuindan kongreson!

Brazila Esperantisto

ISSN 0006-9477

Oficiala Organo de Brazila Esperanto-Ligo ♦ Fondita en 1907 de Alberto A. Vieira, Reynaldo Geyer kaj Everardo Backheuser
Movada kaj kultura revuo ♦ 98-a Jaro Januaro / Marto 2006 N-ro 330 ♦ Aperas trimonate

Respondeca ĵurnalista: Pedro Jacintho Cavalheiro Mtb 32514 ♦ Ĉefredaktoro: José Roberto Tenório <tenorjo@hotmail.com> ♦ Redaktoro pri literaturo: Paulo Sergio Viana <psv@terra.com.br> ♦ Ĉi-numeraj kunlaborantoj: Ísis Climany Okabe Piton, James Rezende Piton, Jimes Vasco Milanez, Pekim Tenório Vaz, Sylla Chaves, Salenka, Osmar da Silva Alves ♦ Grafika aranĝo kaj enpaĝigo: Eldonejo Oportuno ♦ Grafika asistado Luciana do Nascimento Maria Adreso de la redakcio: Rua Francisco Garcia, 168 – Itaquera 08230-560 São Paulo, SP-Brazilo Telefono: (11) 6155-7978

Pri la subskribitaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

Brazila Esperanto-Ligo Fondita en 1907

Prezidanto Pedro Jacintho Cavalheiro Vicprezidanto Paulo Pereira Nascentes 1-a Sekretario Luiz Carlos Rusilo 2-a Sekretario Maria Cecília Milani 3-a Sekretario Marcelo Stoduto 1-a Kasisto Adonis Marcelo Saliba Silva 2-a Kasisto Clarimundo José Barbosa Neto

DEPARTEMENTOJ: Administrado José Carlos Dorini Ramos Eksteraj Rilatoj James Rezende Pinton Eldonado José Roberto Tenório Komerco Aymoré Vaz Pinto Informadiko Adonis Saliba Silva Libroservo Luciano Barbosa da Silva Perkoresponda kurso Maria das Dores Góes Biblioteko Néia Lúcia de Souza Konstanta Kongresa Sekretario Marcelo Stoduto Rilatoj kun Eduka Komitato Paulo Pereira Nascentes Rilatoj kun Asocioj Clarimundo José Barbosa Neto Helpantoj: Luciana do Nascimento Maria (Administrado kaj Eldonado) Sérgio Néri da Mata (Administrado)

EDUKA KOMISIONO: Unua komisionestro Geraldo Mattos Dua Komisionestro Sylla Chaves

Kontrolo Konsilantaro: Dirceu Enei, Joe Brazilio, Paulo Sergio Viana,IVALDO ALVES DE SOUZA, Jason Gonçalves de Lima, Tânia Regina Gertrudes

Komitatano A kaj Ĉefdelegito de UEA James Rezende Piton

FEDERACIA KONSILANTARO: Prezidanto Genildo Martins Coelho Vicprezidanto Alfredo Aragón

Sidejo Ed. Venâncio III – Sala 301/303, Setor de Diversões Sul Poŝtadreso Caixa Postal 03625, CEP 70084-970 Brasília – DF
Telefono (61) 226 1298 Fakso (61) 226 4446 Retadreso bel@esperanto.org.br Hejmpaĝo www.esperanto.org.br

Sendado de kontribuoj al Brazila Esperantisto

- ♦ Se temos pri tradukado, bonvolu ne forgesi indiki la aŭtoron, originalan lingvon kaj fonton.
- ♦ Indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo.
- ♦ Se vi elektos interreton, bonvolu sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon, uzante x-kodon por supersignaj literoj.
- ♦ Fotoj estas ege bonvenaj, sed nepre bonkvalitaj laŭ JPEG-formato.
- ♦ Sendita materialo al la redakcio ne estos redonita.
- ♦ Al la redaktoroj estas rezervita la rajto: 1-e) ne garantii publikigon; 2-e) mallongigi kaj/aŭ traduki tekston laŭbezono; 3-e) ĝin revizii laŭ ortografia gramatika kaj terminologia aspektoj.

A revista Brazila Esperantisto volta a todo vapor!

Reunidos em Brasília, em 7 de janeiro de 2006, o presidente da Liga Brasileira de Esperanto, Pedro Cavalheiro, e o Presidente da União Planetária-UP, Ulisses Riedel, selaram importante acordo ampliando a parceria entre as duas instituições. Essa ampliação entrará para a história das duas instituições!

O que o acordo prevê?

Do lado da UP:

1. Patrocínio da impressão da Revista Brazila Esperantisto. Com isso a revista volta a ser trimestral e terá 24 páginas (ver item 3).

2. Patrocínio para impressão da Revista *Momenton!*.

3. Distribuição da Revista Brazila Esperantisto para os assinantes da UP, o que levará a BEL a colocar em prática um velho sonho da atual diretoria: a revista terá 4 páginas em português transformando-se assim em veículo de divulgação também para fora do movimento esperantista: ação fundamental para a divulgação do Esperanto.

Esclarecendo a importância desse ponto:

A UP iniciou campanha para angariar assinantes, uma vez que não vende espaço comercial devido à sua

proposta institucional. Segundo a operadora de TV a cabo NET, os programas da UP veiculados em várias emissoras do Brasil, já contam com 20 milhões de telespectadores por mês.

O que projeta um número interessante de assinantes. Dessa forma a revista Brazila Esperantisto chegará às casas de tantos assinantes da UP quantos ela vier a conseguir, ficando por conta da UP o aumento progressivo da tiragem da BE de acordo com o número de assinantes que vier a conquistar. Se pensarmos em algo como 0,1% dos telespectadores da UP, neste momento, estaremos falando de 20.000 famílias recebendo nossa revista dentro em breve.

4. O programa de televisão "Esperanto — Instrumento de uma Globalização Solidária" é produzido pela própria UP e apresentado por Paulo Nascentes, vice-presidente da BEL.

5. Serão produzidas inserções institucionais para exibição nos intervalos dos programas da UP para a promoção do Esperanto. Com essas inserções estaremos atingindo uma fatia muito grande dos atuais 20 milhões de telespectadores/mês.

Do lado da BEL:

1. Anúncio da UP em nossa revista com apoio à campanha para



Pedro Cavalheiro e Ulisses Riedel

aquisição de assinantes para aquela produtora.

2. Anúncio da UP objetivando angariar assinantes em nosso Portal.

3. A Liga continuará arcando com o custo da editoração eletrônica da revista.

A parceria entre BEL e União Planetária já incluía *links* do portal de uma instituição para o da outra reciprocamente.

A UP adotou o Esperanto, determinando que todos os seus funcionários façam curso da Língua na própria empresa. Todos chegam para trabalhar e têm curso de Esperanto das 9h às 10h diariamente. A UP já emprega esperantistas há algum tempo. Além disso, a proposta humanista e neutra da UP tem total afinidade com os propósitos e ideais do Esperanto. Agora, o estreitamento dessa parceria simboliza importante apoio mútuo para o bom cumprimento das missões de ambas instituições.

Tudo indica que 2006 será um ano realmente novo e muito bom!

A Liga tem várias maneiras de ouvi-lo: uma delas é por telefone

Escritório Central: (61) 3226-1298, 3226-9433 (61) 3226-4446

Libroservo = Livraria da BEL: (61) 3226-1298, 3226-9433 (61) 3226-4446

Financas: (61) 3226-1298, 3226-9433 (61) 3226-4446

Cursos de Esperanto por Correspondência: (61) 3226-1298, 3226-9433 (61) 3226-4446

Serviços Gerais: (61) 3226-1298, 3226-9433 (61) 3226-4446

Assinaturas de periódicos: (61) 3226-1298, 3226-9433 (61) 3226-4446

Mais de 2000 adesões para o Congresso Universal em Florença

Até o momento foram registados 1867 pessoas de 60 países para o 91º Congresso Universal de Esperanto que acontecerá na famosa cidade Florença, Itália, de 29 de julho a 5 de agosto de 2006. Se o congresso acontecesse hoje, o Brasil estaria bem representado com a participação de 55 esperantistas. Como ainda faltam quase dois meses para o evento, o número deverá crescer, podendo ultrapassar a marca costumeira de dois mil congressistas. O tema principal do congresso deste ano é "Liberdade Cultural no Mundo Diversificado de Hoje"



Papa Bento XVI saúda em Esperanto

Seguindo à tradição do seu antecessor, o novo papa, Bento XVI, saudou os católicos no último domingo de Páscoa, em Esperanto. A Rádio Vaticana também continua com sua programação normal em Esperanto. Os programas vão ao ar três vezes na semana sempre às quartas, quintas e domingo às 5h20m (horário de Brasília). Mais informações no endereço:



<http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/index.asp>

Declaração por ocasião do Dia das Línguas Maternas

Em 21 de fevereiro de 2006, pelo sexto ano consecutivo, foi celebrado em todo mundo o Dia das Línguas Maternas. Este ano a Unesco, idealizadora da celebração, intencionou ressaltar a diversidade lingüística, em outras palavras, a necessidade de manter o mundo linguisticamente diversificado. Entre outras, uma conferência sobre este tema aconteceu na sede parisiense, com a participação dos mais destacados funcionários da organização, justamente para lembrar a sua gravidade.

Foram apresentadas as consequências do desaparecimento das línguas e as iniciativas para conter esse desaparecimento em todas as partes do mundo.

Atenção especial foi dedicada também à iniciativa da União Africana, que declarou o ano 2006 como "O Ano das Línguas Africanas" durante a Reunião Especial da Conferência de Cúpula sobre Cultura e Educação, no final de janeiro em Khartoum, no Sudão.

O Movimento Esperantista filiou-se este ano também à celebração deste dia, cuja idéia motriz é parte essencial dos ideais da comunidade esperantista, e a qual coincide com a Semana da Amizade Internacional, lançada pela Associação Univesal de Esperanto há quatro décadas.


O Esperanto não objetiva substituir outras línguas, mas apenas servir como segunda língua neutra, sem representar os interesses desse ou daquele País grande, e por isso mesmo protegendo todas línguas — grandes e pequenas. Aliás, tal dia foi criado com o objetivo de chamar a atenção para as línguas

maternas, aquelas das minorias nacionais e dos países minoritários no cenário mundial. O movimento esperantista há muito tempo vem chamando a atenção para isto, e podemos nos orgulharmos de que em todas as situações tentamos o possível para, por meio do Esperanto, favorecer justamente tais línguas.

Estamos convencidos do que disse Gandhi sobre a gravidade das línguas maternas: "... a educação verdadeira é impossível por meio de recurso exterior... apenas o ambiente familiar pode estimular originalidade espiritual na maioria das pessoas", bem como o que disse também Zamenhof: "A lingua internacional deseja apenas dar aos homens de diferentes etnias [...] a possibilidade de compreensão mútua, mas de nenhum modo o Esperanto tem a intenção de intrometer-se na vida particular dos povos."

O resumo dessa concepção é apresentada no nosso contínuo slogan "Todos têm o direito de aprender sua língua materna e a língua internacional Esperanto" que aparece no cartaz de apoio ao Dia das Línguas Maternas da Unesco.

(Mensagem divulgada pelo Presidente da Associação Universal de Esperanto -UEA, Renato Corsetti)



Semana Suda Stelaro^(*) — 100 anos do primeiro grupo de Esperanto do Brasil

O Primeiro grupo de Esperanto do Brasil foi fundado em 17 de março de 1906, em Campinas - SP. Como preparativo às comemorações do centenário de fundação do grupo, estudantes da Universidade Estadual de Campinas — Unicamp, juntamente com o Centro Cultural Esperantista de Campinas, organizaram um festival de línguas no auditório da Biblioteca Central César Lattes. O evento, ocorrido neste Campus Universitário entre os dias 17 e 25 de março, contou com 14 palestras, das quais 4 versaram sobre diversos aspectos do idioma Esperanto, e as demais sobre breve apresentação de uma dezena de línguas diferentes, proferidas por professores da própria Unicamp.

Também fez parte da programação do evento a exposição filatélica, "Suda Stelaro — 100 anos", que culminou com o lançamento de um carimbo postal em homenagem ao pioneiro do movimento esperantista em Campinas, Dr. João Keating. A exposição foi enriquecida com a coleção particular "Babel seja destruída", do colecionador James Rezende Piton, também de Campinas.

O evento repercutiu positivamente tanto dentro, quanto fora do Campus Universitário. O jornal da Unicamp publicou matéria de página inteira sobre o festival de línguas. Também o fez O Estadão, um dos mais importantes jornais do País, em sua edição dominical de 26 de março de 2006, no caderno Aliás, cuja tiragem ultrapassou a marca de 300.000 exemplares.

Como parte deste importante jubileu do movimento esperantista nacional, o Congresso Brasileiro de Esperanto deste ano acontecerá em Campinas, entre os dias 15 e 19 de julho, sob a organização do Centro Cultural Esperantista de Campinas e com o auspício da Liga Brasileira de Esperanto.

(Título original da matéria: "Semajno Suda Stelaro", p. 10)

(*) Semana Cruzeiro do Sul

Rudolfs Libeks, o primeiro esperantista estabelecido no Brasil


De há muito tinha-se como pioneiro na divulgação do Esperanto, no Brasil, o imigrante tcheco Francisco Valdomiro Lorenz, autor de um dos livros de gramática do Esperanto mais popular no País, Esperanto sem Mestre.

Pesquisas feitas recentemente, principalmente com a ajuda da internet, faz surgir do passado, mais precisamente da longínqua Letônia, o nome Rudolfs Libeks como herdeiro do título de pioneiro na propagação

do idioma internacional em terras brasileiras.

Libeks nasceu em 5 de março de 1854; além de poeta e escritor, foi também professor, tendo estudado autodidaticamente, entre outras, filosofia, sociologia, teologia, engenharia civil e economia. No Brasil atuou principalmente como professor e agrimensor, além de escrever artigos em sua língua pátria para os seus conterrâneos radicados no Brasil.

(Título do artigo: "Rudolfs Libeks, la unua esperantisto loĝinta en Brazilo", p. 20-21)



Fotos: James Rezende Piton

Além do 41º Congresso Brasileiro de Esperanto, Campinas

também sediará o 26 Congresso Brasileiro dos Jovens Esperantistas e o Congressinho Infantil, destinado às crianças que falam o Esperanto desde o berço. Os organizadores dos três eventos aguardam a participação de cerca de 500 visitantes de várias partes do Brasil e do exterior. Todos os eventos se concentrarão em um único local, o excelente BI Campinas Center de Convenções, no centro da cidade.

(p. 16/17)



Quadro de transcrição fonética do alfabeto do Esperanto

	B	C	Ĉ	D	F	G	Ĝ	H	Ĥ	J	Ĵ	K	L	M	N	P	R	S	Ŝ	T	Ŭ	V	Z
A	bá	tsá	tchá	dá	fã	gá	djá	há	hhá	íá	já	ká	lá	má	ná	pá	rá	sá	chá	tá	uá	vá	zá
E	bê	tsê	tchê	dê	fê	guê	djê	hê	hhê	iê	jê	kê	lê	mê	nê	pê	rê	sê	chê	tê	uê	vê	zê
I	bi	tsi	tchi	di	fi	gui	dji	hi	hhi	íi	ĵi	ki	li	mi	ni	pí	ri	si	chi	ti	uí	vi	zi
O	bô	tsô	tchô	dô	fô	gô	djô	hô	hhô	iô	jô	kô	lô	mô	nô	pô	rô	sô	chô	tô	uô	vô	zô
U	bu	tsu	tchu	du	fu	gu	dju	hu	hhu	iú	ju	ku	lu	mu	nu	pu	ru	su	chu	tu	uú	vu	zu

O Esperanto é uma língua fonética, ou seja, cada letra representa um único som. Seu alfabeto é constituído de 28 letras.

Vogais

o som da letra O [ô] é sempre fechado: FORTA [fôr-ta] = forte
 o som da letra E [ê] é sempre fechado: BEBO [bê-bô] = bebo
 os sons A, I e U soam sempre abertos.

Observação: a acentuação das palavras é regular, sempre na penúltima sílaba. Calculam-se as sílabas de uma palavra pelo número de vogais nela contidas: [á-mí-kô] = amigo > (Três vogais, portanto, três sílabas)

Semivogais

a letra J soa como um 'i' breve em ditongos: NAJLO [ná-i-lô] = prego
 a letra Ŭ soa como um 'u' breve em ditongos: AŬTO [áu-tô] = automóvel

Observação: estas duas e únicas semivogais conservam seus sons breves também em começo e fim de palavras:
 JUNULOJ [iú-nu-lôj] = jovens, MORGAŬ [môr-gau] = amanhã

Consoantes

a letra C soa como "s" antecedido do som "t" [ts]: CINAMO [tsi-ná-mo] = canela
 a letra Ĉ soa como "ch" antecedido do som "t" [tch]: ĈEMIZO [tchê-mí-zô] = camisa
 a letra G soa sempre gutural como na palavra em português "gato": GENETIKO [guê-nê-ti-kô] = genética
 a letra Ĝ soa como o "j" em português, antecedido do som "d" [dj]: ĜARDENO [djár-dê-nô] = jardim
 o som da letra H é levemente aspirado: HAVENO [há-vê-nô] = porto
 o som da letra Ĥ é mais fortemente aspirado: EĤO [ê-hhô] = eco
 a letra Ĵ soa como o nosso "j" em português: ĴURNALO [jur-ná-lô] = jornal
 a letra L soa sempre como "l", nunca como "u": MILDE [míl-dê] = suavemente
 as letras M e N nunca soam nasais como em português: AMANTO [á-má/n-tô] = amado
 o som do R soa sempre fraco como o "r" em Maria: NUMERO [nu-mê-rô] = número
 o som da letra S é sempre sibilante: SEMO [ssê-mô] = semente
 a letra Ŝ soa como "ch": POŜO [pô-chô] = bolso
 as demais letras: B, D, F, K, P, T, V e Z pronunciam-se como em português.

Síntese Gramatical

- O artigo definido **LA** é invariável e se traduz por: *a, a, os, as*; não existem os artigos indefinidos: *um, uma, uns, umas*.
- Terminações gramaticais são quatro: **O** = substantivo, **A** = adjetivo, **E** = advérbio derivado, **I** = verbo. Exemplo: AMO = amor, AMA = amoroso/a, AME = amorosamente, AMI = amar.
- Verbos. Não existem conjugações verbais em Esperanto, há apenas cinco flexões verbais para indicar: presente — **AS**, passado — **IS**, futuro — **OS**, condicional — **US**, imperativo/subjuntivo — **U**. Exemplo: eu escrevo/ ele escreveu/ tu escreverás/ eles escreveriam/ escrevamos nós > mi skrib**as**/ li skrib**is**/ vi skrib**os**/ ili skrib**us**/ ni skrib**u**
- As palavras compostas formam-se pela simples junção dos radicais, indo a palavra principal para o final da composição: LIBROKOLEKTO (KOLEKTO DA LIBROJ) = coleção de livros.
- O plural das palavras é formado pela letra 'J' (e tem o som de um "i" breve), tanto para os substantivos, quanto para os adjetivos: AMIKOJ [a-mi-kôj] = amigos; TRI FIDELAJ AMIKOJ [tri / fi-dê-lái / a-mi-kôj] = três amigos fiéis.
- Omite-se a palavra NE (não) de uma sentença, se nela já houver outra negativa: MI VIDIS NENIUN = Eu não vi ninguém.
- O complemento verbal, isto é, o termo que se liga diretamente ao verbo, ampliando ou completando-lhe o sentido, é assinalado pela letra N: MI vokis NENIUN = eu não chamei ninguém — MI V vokis NENIU = ninguém me chamou.
- A vogal final do substantivo e do artigo pode, comumente em poesia, ser eliminada e substituída por um apóstrofo: *La viv' de l' plantoj* [la vív del plan-tôj] (la vivo de la plantoj) = a vida das plantas.

Revuo Brazila Esperantisto revenas plenvigle!

Kunveninte en Braziljo, je la 7-a de januaro 2006, la prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, Pedro Cavalheiro, kaj de UP (Unio Planeda), Ulisses Riedel, alvenis al grava interkonsento kiu ampleksigas la partnerecon inter la du institucioj. Tiu ampleksigo historie markos ambaŭ instituciojn.

Kion antaŭvidas la interkonsento?

El la flanko de UP:

1. Subvencion al presado de la revuo Brazila Esperantisto. Per tio la revuo denove fariĝas trimonata kun 24 paĝoj (legu paragrafon 3).
2. Subvencion al presado de la revuo *Momenton!*
3. Dissendadon de BE al la abonantoj de UP, kio ebligas al Ligo efektiviĝi longjaran revon de la nuna estraro, nome la revuo prezentos 4 paĝojn en la portugala, tiel ke ĝi rolos kiel komunikilo ankaŭ ekster la esperantista movado: fundamenta agado por diskonigo de Esperanto.

Klarigo pri la graveco de tiu ĉi punkto:

Ĉar UP, pro siaj agadaj proponoj, ne disvendas komercanoncojn, ĝi starigis kampanjon por varbado de abonantoj. Laŭ la kabla televidkompanio NET, la programoj de UP elsendataj al pluraj brazilaj televidstacioj jam enkalkulas 20 milionojn da spektantoj monate, kio signifas interesan nombron da abonantoj. Tiamaniere la revuo BE envenos la domojn de tiom da abonantoj de UP, kiom ĝi sukcesos varbi; koncerne al la eldonkvanto de BE, ĝi kreskos proporcie al la kreskado de UP-abonantaro. Se pensi pri nura 1% el la televidspektantoj de UP, tiam oni aludas al dudek mil familioj baldaŭ ricevontaj nian revuon.

4. La televiprogramo “Esperanto — Instrumento de uma Globalização Solidária” (Esperanto — Ilo por Solidara Tutmondigo) estas produktata de UP mem kaj prezentata de la vicprezidanto de BEL, Paulo Nascentes.

5. Estos produktitaj porinstituciaj reklametoj por aperigo dum la programpaŭzoj de UP cele al diskonigo de Esperanto. Per tiaj reklametoj ni atingos konsiderindan niĉon el la nunaj 20 milionoj da monataj televidspektantoj.

El la flanko de BEL:

1. Reklanon de UP en nia revuo apoge al la kampanjo por akiro de abonantoj por tiu televidproduktanto.
2. Reklamon de UP en nia retejo cele al varbado de abonantoj.
3. La Ligo daŭre elspezos por la elektronika kompostado de la revuo.

La partnereco inter BEL kaj UP jam antaŭe inkluzivis reciprokan retligilon de unu institucio al alia.

UP adoptis Esperanton, instigante ke ĉiuj siaj funkciuloj vizitu kurson de la lingvo ene de la entrepreno mem. Ĉiutage, alveninte por labori, ĉiuj ĉeestas kurson de Esperanto de la 9a ĝis la 10a horo. Jam de kelke da tempo UP laboristigas esperantistojn. Krome, la homama kaj neŭtrala proponoj de UP tute harmoniiĝas kun la celoj kaj idealoj de Esperanto. Nun, la alproksimiĝo de tiu partnereco signas gravan reciprokan kunhelpon por la bona plenumado de la misioj de ambaŭ institucioj.

Ĉio indikas, ke 2006 estos jaro ja nova kaj tre fruktodona!

La Estraro

La informon kiun vi bezonas, vi trovos tie ĉi!

www.esperanto.org.br



Brazila Esperanto-Ligo

Liga Brasileira de Esperanto

Semajno Suda Stelaro

100 jaroj de la unua Esperanto-grupo de Brazilo



Antaŭ cent jaroj, je la 17a de marto 1906, fondiĝis en Campinas la unua Esperanto-klubo de Brazilo, Suda Stelaro. Kadre de tiu grava jubileo de nia landa movado, ĉi-jare la urbo estas ekzemple la sidejo de la 41a Brazila Kongreso de Esperanto, krom multaj aliaj datrevenaj omaĝoj, konsulteblaj ĉe <http://www.esperanto.cc/centenario>.

En la lasta marto, por precize signi la centjariĝon, okazis en la Universitato de Campinas (Unicamp) la evento Semajno Suda Stelaro, organizita de la studenta Esperanto-grupo de Unicamp kaj de Kultura Centro de Esperanto – Campinas. Konsistanta el festivalo kun prelegoj pri lingvoj kaj pri pluraj aspektoj de Esperanto, filatela ekspozicio kaj malfermo de novaj Esperanto-kursoj en Unicamp, la evento reprezentis gravan dialogon kun la universitata medio.

Lingva Festivalo

Kun la temo “Esperanto kaj Lingva Diverseco”, dum du tagoj la aŭditorio de la Centra Biblioteko Cesar Lattes gastigis la lingvan festivalon de Semajno Suda Stelaro. Ĝi konsistis el sume 14 prelegoj, el kiuj kvar temis pri diversaj aspektoj de Esperanto kaj la ceteraj pri fulma prezento de dek malsamaj lingvoj, fare de invititaj instruistoj de la Centro de Lernado de Lingvoj kaj de la Instituto pri Studoj de la Lingvaĵo de Unicamp.

En la unua tago, la 16an de Marto, oficiale malfermis la eventon salutparoladoj de David Bianchini, prezidanto de KCE, Maria Cecília Fraga, direktorino de la Centro de Lingvoj de Unicamp kaj James Vasco Milanez, nome de la studenta Esperanto-grupo de Unicamp. Tuj sekvis prelego de David Bianchini pri la ĉeftemo, “Esperanto e Diversidade Lingüística”, analizante la historion de lingva hegemonio kaj ties efikojn kaj komparante la pozitivan rolon de neŭtrala pontlingvo por pli racia scenejo de lingvolernado. Scenejo en kiu ĉiu lernu ne trudatan komunikilon, sed la ŝatatajn aŭ vere bezonatajn lingvojn (ekzemple, por loĝado en alia lando aŭ studado de ĝia kulturo).

Laŭ malsamaj vidpunktoj, kvin lingvoj, kulturoj kaj rilataj temoj estis prezentitaj en la unua tago: germana (Michael Barth), hispana (Silvia Poblete Castro), rusa (Nivaldo dos Santos), ĉina (Hsu Su Chiao) kaj franca (Rosa Maria Nery). Dum la prelego pri la germana



Ismael Mattos A. Ávila

pritraktis ekzemple oportunojn pri studado en Germanio, ĉe la hispana estis reliefigitaj la trompaj mesaĝoj kiuj kutime akompanas lingvan propagandon kaj la malfacila vivo de enmigrintoj en Hispanio. Plue, la preleganto de la rusa faris tre klarigan paroladon pri la historio de Rusio; ĉu vi sciis ekzemple ke tradicie la rusa nobelaro kutimis paroli ne ruse, sed france? Sekvis prezento de la ĉina lingvo, la historio de la ideogramoj kaj interaga ludo kun la publiko pri la signifo de kelkaj bazaj simboloj, kaj fine la invitita instruistino de la franca elmontris helpe de repaĝo kelkajn kaŝitajn kulturajn aspektojn malantaŭ lingva uzado.

Fermis la programon de la unua tago prelego pri “O Desafio das Línguas”, fare de Ismael Mattos Andrade Ávila, tradukinto al la portugala de la samnoma libro de Claude Piron. Inter la nerefuteblaj faktoj prezentitaj pri la tradukaj kostoj ĉe internaciaj organizaĵoj kaj pri ceteraj flankoj de komunikaj malfacilaĵoj, aparte kaptis la atenton de la spektantoj trafa interaga

elmontro de la bremsa efiko de esceptoj en la lernado. Volontuloj el la publiko devis apartigi ludkartojn laŭ esceptoplenaj reguloj postulantaj multe da mensa energio, kaj poste laŭklara “nigraj maldekstren, ruĝaj dekstren”. Simpla, sed tre bildiga ekzemplo kiu certe restis en ĉies memoroj.

La programo de la 17a de Marto 2006, la jubilea tago, estis same riĉa. Malferme estis projekciita la dokumentario “Esperanto: Respeito em Todas as Línguas”, de Eduardo Garcez. Tuj poste sekvis la ĉefprelego, de James Rezende Piton, pri la cent jaroj de la fondiĝo de la unua Esperanto-klubo de Brazilo: “Suda Stelaro, uma ONG na Campinas de 1906”; James, kiu jam de pli ol jardeko kolektas informojn kaj verkas libron pri la temo, prezentos specialan prelegon pri Suda Stelaro kaj ties pioniroj dum la internacia simpozio de la 41a BKE.

Pliaj kvin lingvoprezentadoj okazis en la dua tago: japana (Fumiko Takasu), angla (Thelma Eloísa de Oliveira), brazilaj indiĝenaj lingvoj (Frantomé Pacheco), latina (Marcos Aurélio Pereira) kaj itala (Regina Célia da Silva). Komence, ĉiuj povis lerni kelkajn bazajn esprimojn en la japana (kun kelkaj subtekstoj rekte en Esperanto!) kaj konstati la similecon de la strukturoj de Esperanto kaj de orientaj lingvoj, ekzemple ĉe vortkunmetoj. Plian agrablan surprizon provizis la prelegantino de la angla, kiu fine de sia prelego kantis en klara Esperanto kaj

malkaŝis esti lerninta Esperanton dum sia junaĝo; ŝi krome prelegis pri la historio de la angla lingvo, kiu naskiĝis el ĝermana tribo veninta de “angulo” de la nuntempa Nederlando. Same kaptis la atenton interesa komparo de la preĝo “Patro Nia” laŭ la evoluo tra Old English, Middle English, Early Modern English kaj Late Modern English. (*)

Eksterordinaran scivolon vekis en la publiko la prelego pri brazilaj indiĝenaj lingvoj. Per geografiaj kaj fonetikaj mapoj, la preleganto klarigis la plurajn trunkojn kaj familiojn de la ceteraj lingvoj parolataj en nia lando kaj aspektojn de la vivo de la indiĝenoj; debatiĝis kun la publiko ankaŭ historiaj influoj inter indiĝenaj lingvoj kaj la brazilportugala. Historie grava same estis la sekva prezento de la latina lingvo, ties historio kaj loko en la hindeŭropa arbo; estis aparte distingita la nuntempa plustudado en akademia medio disde la eklezia uzo, kaj reliefigita la kultura utileco de ĝia lernado. La lasta lingva prelego estis tiu de la itala, en la itala. Post la komenca miro, la publiko sukcesis sufiĉe glate

(*) Pra-angla, Mezangla, Antaŭmoderna Angla kaj Plejmoderna Angla. (La red.)

akompani la prelegon danke al uzo de facilaj vortoj kaj klara prononco. Por fermi la festivalon, José Joaquín Lunazzi faris prezenton pri “Esperanto: Presente



Prof-ino Thelma Eloisa de Oliveira

e Futuro”, kun emfazo pri la realo kiun esperantistoj jam ĝuas dum la mondo baraktas kun siaj lingvaj problemoj.

La publiko ne estis tiel granda kiel dezirate, sed simila al tiuj de la ordinaraj eventoj en la universitato. La vasta informado farita tamen firmigas en oniaj mensoj la ideon ke Esperanto ekzistas, ke estas io uzata kaj ke ĝi respektas la aliajn lingvojn, des pli

danke al la reeĥoj atingitaj, kiel tutpaĝa artikolo pri Esperanto en la ĵurnalo de la universitato. La plej multaj invititaj prelegantoj de aliaj lingvoj sintenis simpatie al Esperanto; la nura kiu ripetis kelkajn konatajn mitojn estis la germano, sed kiu devis almenaŭ parte agnoski nescion post kelkaj kontraŭ-argumentoj de ĉeestantaj esperantistoj. La kvar Esperanto-prelegoj, spektitaj ankaŭ de kelkaj el la aliaj prelegantoj, aliflanke provizis trafajn informojn kaj reprezentas plian paŝon por sentabuigo de Esperanto en universitataj medioj. Certe ankaŭ pozitive influas la kulturmalferma kaj propedeŭtika efiko de Esperanto, tra kelkaj membroj de la studenta grupo kiuj interesiĝas ankaŭ pri aliaj lingvoj instruataj en la universitato, kio helpis pavimi la vojon por la evento. Konklude, la neta rezulto estas tre pozitiva kaj temas pri imitinda iniciato en aliaj lokoj, kiel bonega vojo por establi kontakton kun la universitata komunumo kaj precipe kun alilingvaj instruistoj.

Prof-ro David Bianchini



Filatela ekspozicio kaj novaj kursoj de Esperanto



Sed ne nur el la lingva festivalo konsistis Semajno Suda Stelaro. Ankoraŭ en la jubilea tago, la 17an de marto, okazis vespere en la enirhalo de la Centra Biblioteko César Lattes la malferma ceremonio

de la filatela nekonkursa ekspozicio “Suda Stelaro – 100 jaroj”, sub la zorgoj de CTC – Centro Temático de Campinas¹ kaj speciale de ĝia membro kaj esperantisto James Rezende Piton. Kun la ĉeesto de reprezentantoj de Correios², de CTC, de KCE³ kaj de EASP⁴, dum la ceremonio estis lanĉita oficiala memoriga poŝta stampo, kiu, krom la mencio pri la centjara jubileo de la fondiĝo de Suda Stelaro, surhavas la vizaĝon de ties pioniro João Keating. Kultura Centro de Esperanto krome lanĉis omaĝan poŝtkarton, kiu estis uzita de la ĉeestantoj por

dissendi salutojn uzante la memorstampon. La poŝtkarto plu estas aĉetebla ĉe KCE.

La originala kalendaro antaŭvidis montradon dum unu semajno, tamen pro la intereso de la publiko kaj de la biblioteko ĝi plu estis vizitebla dum plia semajno; centoj da homoj preterpasas ĉiutage ties enirhalon kaj multaj haltis dum momento por ĝui la ekspozicion. Inter la variaj filatelaĵoj, elstaris la internacie premiita kolekto “Babelo estu detruita!”, de James Rezende Piton; el la priskribo en la paĝaro de la centjariĝo:

“Tra siaj 80 folioj, la kolekto priskribas la demandon pri internacia komunikado, la solvojn proponitajn tra la jarcentoj kaj la historion de Esperanto, kiel solvon kiu en la praktiko montriĝis aplikinda. La vizitanto povos konatiĝi kun poŝtmarkoj, poŝtstampoj kaj poŝtaj tutaĵoj (kartoj aŭ kovertoj kun surprisita afrankpovo), kiuj rakontas la vojon kaj la strukturon de Esperanto.”

“Oni ankaŭ konstatos kiel lingvo kreita por faciligi pacon estis atingita de militoj. Oni ekspoziciis kelkajn

(1) Filatela Centro de Kampino, (2) Brazila Oficiala Poŝtoservo

(3) Kultura Centro de Esperanto, (4) Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (La red.)

Esperanto en Unicamp: lastatempaj atingoj

Inter la pluraj publikoj celeblaj por informado pri Esperanto, certe ne indas neglekti la universitatan. Sur la benkoj de la universitatoj sidas hodiaŭ multaj estontaj sciencistoj, entreprenistoj, politikistoj, opinioformantoj aŭ simple homoj kun aktiva kultura vivo kiuj influos sian ĉirkaŭaĵon. Krome, konsiderante ke universitatoj estas kaldronoj de ideoj kie oni rezonas kaj debatas

amplekse pri la socio kaj la scienco, en kiuj troviĝas amaso da junuloj plenaj de demandoj kaj debatemo, tiu medio prezentiĝas kiel des pli taŭga semejo.

En Brazilo, Unicamp (Ŝtata Universitato de Campinas) ekde la sepdekaj jaroj pli malpli konstante havas siajn aktivajn esperantistojn. Du gravaj pioniroj estis Prof-ro Ivanhoé Baracho, kiu en oktobro de 1978 fondis la unuan Esperanto-grupon de la universitato, redaktis en la okdekaj jaroj fakan gazeton "Hodiaŭa Genetiko" kaj kiu plej longe aktivis en Unicamp, kaj Emilio Cid, kiu studis fizikon en la universitato kaj dum sia epoko de studento gvidis kursojn de la lingvo en ĝi. Jam dum la naŭdekaj jaroj, Prof-ro José Joaquín Lunazzi esperantistiĝis kaj komencis poresperantan agadon en Unicamp, kiu daŭras ĝis la nuntempo; James Piton ankaŭ studis sampeke en la universitato. En 1993, Kultura Centro de Esperanto – Campinas fariĝis la unua brazila Esperanto-grupo kun propra retadreso, kompleze de Unicamp; en 1996 estis lanĉita CER – Curso de Esperanto pela Rede, pionira en la portugala lingvo, kunordigata de Lunazzi kaj ekde 2001 gastigata de Teleduc, sistemo por demalproksima instruado de Unicamp. Alia nomo kiu ne povas manki en la listo estas Juscelino Gama, kiu fine de la naŭdekaj jaroj estis nova motoro de la Esperanto-



grupo, gvidante kursojn en la Instituto de Matematiko.

En la jaro 2001 eniris la universitaton la gefratoj James kaj Molina Milanez, kiuj tuj establis kontakton kun la esperantistoj de Campinas; tamen en Unicamp la antaŭa grupo jam ne plu funkciis. Krom la personaj babiladoj kun profesoro Lunazzi, nova movada sperto tie okazis dum la dua semestro de 2001, kiam James gvidis bazan kurson al kelkaj amikoj. Alia kontakto okazis en la sama jaro, en programo pri Esperanto gvidita de alia junulo ĉe Radio Muda, sed kiu same ne daŭris. En la sekva jaro, provo restarigi la ĉeestan grupon ne estis sukcesa; kaj la tuta jaro 2002 estus apenaŭ rimarkata, se ne estus la restarigo de la grupo en interreto per fondo de Unicamp-Esperanto, diskutlisto en Yahoogrupoj, kiu ĉi-jare kompletigas kvar jarojn da ekzisto kaj 230 membrojn.

La perspektivoj komencis ŝanĝi en 2003, jaro kiu reprezentas gravan mejloŝtonon por la lastatempaj atingoj en Unicamp. Per la instigo de amikoj, James preparas novan bazan kurson kaj decidas malfermi klason; ĉi-foje la kursoj estas diskonigataj al la ĝenerala publiko. Superante la plej optimismajn prognozojn, 60 personoj aliĝas: plia klaso malfermita kaj la unua salto de la membraro de Unicamp-Esperanto. Dek kvin lecionojn poste, duono de la

aliĝintoj diplomiĝas baznivele. En la dua sesmonato, James gvidas daŭrigajn kursojn kaj Molina ekinstruas baznivele; denove la kursojn finas duono de la komencintoj. Multaj novaj interesitoj aperas, la listo Unicamp-Esperanto superas 100 membrojn. La bilanco de la jaro estas tre pozitiva: la grundo estas fekunda kaj la afero jam estis senrevena. Laŭlonge de 2004 okazas kursoj en ĉiuj niveloj, novaj diskonigoj senĉese okazas; la plej multaj kursoj okazas en la Instituto de Matematiko kaj en la Fakultato de Elektra Inĝenierado kaj Komputado, neoficiale, tamen kun formala permeso pri uzo de la ĉambroj. Venas la unuaj diplomitoj de supera nivelo.

En 2005 novaj ventoj blovas. Kun la plej entuziasmaj finintoj de la supera kurso, formiĝas grupo kaj ĉiusemajnaj kulturaj kunsidoj: pritemaj babiladoj, studado de la libro *Vojaĝo en Esperanto-Lando*, kunsidoj en komputilejo, primovadaj diskutoj, krom semajnfinaj interretaj babiladoj. Aliflanke, en la unua semestro Molina lastfoje gvidas bazan kaj mezan kursojn: venas la momento forlasi la universitaton. Sed la laboro devas daŭri. La grupo decidas eksperimenti en la dua semestro novan kursoformaton, eks-presan: mallongaj kursoj de enkonduka nivelo, kiuj donu superrigardon de la lingvo kun la celo ĉefe informi. Tiel, eblas maksimumigi la efikecon de tiu unua kontakto kun la lingvo, kun pli da instruistoj kaj oferto de pli da klasoj; el la finintoj, tiuj vere

LA IDIOMO SEN PATRIO

Kiel rezulto de la vasta informado farita okaze de Semajno Suda Stelaro, Esperanto kaptis la atenton de la komunika fako de Unicamp kaj eĉ de eksteraj amaskomunikiloj.

La 16an de Marto, la malferma tago de la Semajno per lingva festivalo en la aŭditorio de la Centra Biblioteko César Lattes, noto aperis sur la ĉefa paĝo de la portalo de la universitato, krom artikolo pri la evento plu legebla ĉe:

Lingva diverseco malfermas "Semajno Suda Stelaro" http://www.unicamp.br/unicamp/divulgacao/BDNUH/NUH_5831/NUH_5831.html

En la sekva semajno, de la 20a ĝis la 26a de Marto, Ĵurnalo de Unicamp aperigis en sia dorskovrilo tre favoran tutpaĝan artikolon pri Esperanto, la grupo de la universitato kaj la festado de la centjariĝo de Suda Stelaro. La kolora paĝo kun granda foto de libroj kaj revuoj en Esperanto donas tre allogan aspekton al la artikolo, kaj krome estis publikigita dulingva teksto, en Esperanto kaj la portugala, tiel ke la legantoj povu ekzerci sian scivolon:

La idioma sen patrio:
http://www.unicamp.br/unicamp/unicamp_hoje/jornalPDF/ju316pg12.pdf

Kun semajna eldonkvanto de 10.000 ekzempleroj, disdonataj al la interna publiko, al eksteraj abonantoj kaj redakcioj de multaj aliaj komunikiloj, la artikolo reprezentis rimarkindan atingon de la evento. De tiam, membroj de la grupo de Unicamp kaj de Kultura Centro de Esperanto, organizantoj de Semajno Suda Stelaro, jam estis plurfoje kontaktitaj de ĵurnalistoj kun demandoj pri Esperanto, kiel ekzemple de O Estado de São Paulo, pri kies raporto vi ankaŭ povas legi en tiu ĉi numero de BE.



Unicamp - 40 jaroj da historio

Kiel pri la 100 jaroj post la fondo de la unua Esperanto-grupo de Brazilo, Suda Stelaro, 2006 estas festa jaro ankaŭ por Unicamp. Antaŭ 40 jaroj, je la 5a de Oktobro 1966, estis lanĉita la fundamenta ŝtono de ties centra kampuso, laŭ la projekto de ĝia fondinto, Zeferino Vaz.

Se 40 jaroj estas relative mallonga tempo kompare al la aĝo de multaj aliaj prestiĝaj universitatoj, la juna Unicamp jam estas inter la plej gravaj kaj renomaj brazilaj universitatoj kaj respondas pri ĉirkaŭ 15% de la tuta brazila universitata esplorado. Ĝia instruado same havas fortan tradicion kaj ĝia porenira ekzameno estas unu el la plej konkuraj de la lando; nuntempe 32.000 studentoj frekventas la kvar kampusojn, en Campinas, Piracicaba, Limeira kaj Paulínia.

Gratulon, Unicamp, pro via datreveno!

Daŭrigo de paĝo 12

interesitaj povas aliĝi poste al ordinara kurso. Malfermiĝas kvin klasoj, kun dufoja okazigo dum la semestro, pri kiuj respondecas Jimes Milanez, Harlen Batagelo, Ricardo Dias Almeida kaj Lucas Vignoli Reis: sume 110 homoj aliĝas, se konsideri la nombron de venditaj lernilokompletoj (la nura kosto de la kurso). La interreta grupo transpasas 200 membrojn; eĉ se ne ĉiuj estas aktivaj partoprenantoj, preskaŭ ĉiuj iamaj aliĝintoj al la kursoj plu

membras en la listo kaj ricevas la novaĵojn tie dissendatajn: nun, ili minimume estas informitaj homoj. Fojfoje iu lerninto agrable rekontaktas nin kaj montras ke la tuta laboro valoris la penon.

Kaj nun venas ne fino, sed nova komenco. Pri la aktivajoj jam okazintaj en 2006, jam parte rakontas la artikolo pri Semajno Suda Stelaro. Krom la laboroj pri la organizado de la Semajno, la artikolo en Ĵurnalo de Unicamp kaj la novaj kursoj nun

gvidataj, rekomenciĝis la semajnaj kulturaj kunsidoj kaj kompreneble la retrokalkulo por la kongreso en Julio, kiun la plej aktivaj grupanoj ĉeestos. Krome, novaj esperantistoj ĵus alvenis al la universitato kaj aliaj lernintoj reengagiĝas: eĉ se iuj devos baldaŭ foriri, en la proksima estonteco Esperanto certe plu brilos en Unicamp.

Diskutlisto Unicamp-Esperanto
<http://groups.yahoo.com/group/unicamp-esperanto>
Blogo uzata por diskonigo de kursoj kaj novaĵoj
<http://unicamp-esperanto.blogspot.com>



41-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO
26-a BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA KONGRESO
"Lerni kunvivadi – Esperanto kiel ilo por homa disvolviĝo"
 Campinas, de la 15-a ĝis la 19-a de Julio 2006

41bke@esperanto.cc

Caixa Postal 1097
 Campinas-SP 13012-970

<http://www.esperanto.cc/bke>

NOVA TELEFONNUMERO POR KONTAKTO KUN LKK
 (tamen ne por hotelaj kaj rezervaj aferoj):
(19) 3287 8228

DUA CIRKULERO

KONGRESEJO *BI Campinas* Centro de Convenções (Espaço Arcadas) –
 Rua José Paulino, 1369 – Centro.

ALIŬPERIODO PLILONGIGITA - La dua aliĝperiodo, kiu finiĝis en Marto, estas plilongigita. Tiuj prezoj validos ĝis la 31-a de Majo.

PROGRAM-SKEMO Estas proponata eksperimenta sinsekvo de tagoj por la 41-a BKE, de sabato ĝis merkredo. Pro la granda nombro de esperantistoj en la distanco de 200-300 km de la urbo, indas fari la aranĝon tiel ke eĉ neferiantoj ĝuu almenam la kongresan semajnfinojn.

JULIO	Sabato (15)	Dimaĉo (16)	Lundo (17)	Mardo (18)	Merkredo (19)
matene	- akcepto	- prelejoj - kurso por komencINToj	- prelejoj - kurso por komencINToj	- prelejoj - kurso por komencINToj	- prelejoj - solena fermo
p.t.m.	- akcepto - prelejoj	- baza kurso - prelejoj - Federacia Konsilantaro	- baza kurso - prelejoj - BEL-sembleo	- baza kurso - prelejoj - BEL-sembleo	- duontagaj ekskursoj
vespere	- malfermo	- surplaca muzikumo	- balo	- arta vespero	

PROGRAMEROJ LKK volas, ke oni kiel eble plej kaptu la okazon kongresi por kleriĝo kaj aktiviĝo. Sed evidente grava aspekto por kongresumado estas renkonti/konatiĝi kun amikoj. Tion ni eksperimente formaligos en la 41-a BKE, per programaj pamzroj. Oni povas, lam la deziro de partoprenantoj, iom plilongigi la antaman programeron, sed la pamzroj principe celas, ke oni malstretigi, vizitu ekspoziciojn, babilu. La ĉeesto en prelejoj mem sekve povus esti maksimuma. Jene: 09h00-09h45, programero 1; 09h50-10h35, programero 2; 10h35-11h00, paŭzo; 11h00-11h45, programero 3; 11h50-12h35, programero 4; 12h35 tagmanĝo; 14h00-14h45, programero 5; 14h50-15h35, programero 6; 15h35-16h00, paŭzo; 16h00-16h45, programero 7 kaj 16h50-17h35, programero 8.

PROGRAM-KONTRIBUOJ Oni plu invitas homojn pretajn prelegi pri la plej diversaj temoj kaj organizantojn de alispekaj programeroj. La prezidanto de la Akademio de Esperanto, Prof-ro Geraldo Mattos, kaj Prof-ro Sylla Chaves estas du el niaj prelegontoj. Demokratio, filmado-teknikoj, nuklea energio, Anarkio kaj Esperanto, komputil-desegnado kaj tradukarto estas nur kelkaj el la tre variaj temoj, kiujn oni spektos. Tamen ne nur spektu, disponigu mem viajn sciojn!

INTERNACIA SIMPOZIO "La lokaj Esperanto-grupoj kiel komunuma socia kapitalo: historiografia kaj sociologia aspektoj" estas aranĝo, kiu okupos la matenojn de dimanĉo kaj lundo kaj pri kiu respondecas D-ro José Antonio Vergara (ililo) kaj D-ro José Joaquín Lunazzi (Brazilo/Argentino), Speciala invitita prelegonto estas Aleksander Korjhenkov (Rusio), redaktoro de "La Ondo de Esperanto" kaj aŭtoro de pluraj libroj, plej laste "Historio de Esperanto".

BEJO-KONGRESO La 26-a BEJK havos propran ĉambrom kaj la strukturon de la 41-a BKE. Ties programo enhavas prelejojn, ludojn, dancojn ktp. Nova estraro elektigos. Pliaj detaloj kaj novaĵoj ĉe:

<http://bejk2006.blogspot.com>

INFANA KONGRESETO Pli ol vartejon, oni organizas tutan programon de dimanĉo ĝis mardo por infanoj kun aĝo ĝis 12 jaroj. Oni akceptos ankaŭ infanojn, kiuj ne scipovas Esperanton, sed la ludoj kaj aktivaĵoj, plej allogaj, gravitos ĉirkaŭ la uzo de la lingvo. Deko da E-denaskuloj jam estas aliĝinta. Ĉar la nombro de aliĝeblecoj estas tre limigita, se via infano volas partopreni la Kongreseton kontaktu isis@esperanto.cc ĝis la 31-a de Majo por ricevi la priskribon kaj kondiĉojn aŭ vizitu la kongresan hejmapaĝon.

KURSOJ Bazan Esperanto-kurson instruos Guilherme Jardim (Charqueada-SP) per sia propra libro, kiu estos la sola kosto de la 7-hora kurso: R\$ 10,00 - Kontaktu guilherme@winart.com.br

Cseh-metodon por komencINToj, do por homoj kun bazaj scioj pri Esperanto, aplikos Neusa Priscotin Mendes (Ribeirão Preto-SP). Kosto de R\$ 20,00 por la tuta tritaga kurso. Oni antaŭanoncu sin ĉe sauen@netsite.com.br

Porinstruistan kurson tritagan gvidos Pedro Cavalheiro (São Paulo-SP) laŭ la nombro de interesatoj. Kontaktu p.cavalheiro@globo.com

ARTAJ ARANĜOJ Kelkaj artaj programeroj prezentiĝos kiel tradicie en la Solena Malfermo. Dimanĉe, la 16-an de Julio, oni havos vespere surplacan muzikumadon en historia orkestrejo de la urbocentro de Campinas, ĉe placo Carlos Gomes. Artisto speciale invitita de la kongreso por tiu vespero estas la franco JoMo. En lundo oni havos la kongresan balon kaj en mardo duan artan vesperon. Respondekas pri la artaj aranĝoj d-ro Lunazzi – lunazzi@esperanto.cc

HOTELOJ La elektitaj hoteloj estas la plej konvenaj laŭ distancoj kaj prezoj. Pri la rezervoj oni kontaktu kiel sube. LKK sukcesis kontraktojn, kiuj garantias maksimuman avantaĝon por la kongresanoj. Laŭ la nombro de gastoj, ankam la tuta kongresa aranĝo havos de tio avantaĝojn. La sube prezentitaj prezoj rilatas al la kosto por unu ĉambro, lam la ĉambro-speco. Oni garantias ĉiujn prezojn de la tabelo almenaŭ ĝis la 31-a de Majo. Escepte de la unua hotelo, la aliaj senpage disponigas matenmanĝon kaj parkejo.

hotelo	distanco	1-lita	2-lita	3-lita	rimarkoj
I	apud la kongresejo	-	85,00	115,00	aldonaj 5% pro ISS kaj sen matenmanĝo
II	je 5 domblokoj	65,00	80,00	105,00	kun rajto je matenmanĝo kaj parkejo
III	je 2 domblokoj	51,00	77,00	98,00	kun rajto je matenmanĝo kaj parkejo

Por la rezervoj kaj rilataj aferoj kontaktu
 Anahi Lunazzi (en la portugala):
hospedagem@esperanto.cc
 aŭ (11) 3219 0599 (post la 19h00 (11) 9116 9079)

KOMUNA LOĜEJO Oni ankoraŭ ne sukcesis atingi definitivan solvon, do ni ne povas informi pri kondiĉoj am kosto de tiu alternativo, LKK tamen ne rezignis pri siaj klopodoj iel disponigi tiun servon.

MANĜOJ En la kongresejo estas tre bonaj pokilograma restoracio kaj kafejo. Surloke troviĝos informoj pri aliaj diverstipaj manĝejoj.

EKSKURSOJ Posttagmeze de merkredo, la 19-a de Julio, post la fermo de la Kongreso, oni havos duontagajn ekskursojn, kiel veturado en vera vaportrajno. Dum 5amdo pretigu vin por tuttagaj ekskurseblecoj en la urbo kaj en la regiono. Konfirmon pri partopreno oni bezonos nur dumkongrese.

Kampino: gasturbo de la ĉijara BKE

Fondita en 1774, Kampino havas 887 kvadratajn kilometrojn, el kiuj la kamparo okupas 53%. Tiu kamparo pli rilatas al la komerca aktivado kaj loĝejoj en riĉaj kvartaloj.

La “urbo” mem estas dense loĝata, kiel spaco de granda movebleco (ankaŭ por la loĝantaro de la metropola regiono). Plej granda neĉefurbo en Brazilo, en 2003 ĝi atingis 1 milionon da loĝantoj. Tiu kreskis inter la 1970-aj kaj 1980-aj, kiam du trionoj de la loĝantaro konsistis el homoj ne naskitaj en la urbo.

La ekonomion de Kampino markas centro de alta teknologio kreita en la 1970-aj danke al la disvolviĝo de *Unicamp* (unu el la plej grandaj kaj gravaj klerigaj kaj esploraj institucioj en Brazilo). Tiu teknologia poluso firmiĝis en la postaj jardekoj kaj igis la urbon unu el la plej viglaj ekonomiaj centroj en Sudameriko.

Sekve kreiĝis kompleksa komerca kaj serva reto, kiu allogis aliurbanajn kaj riĉigis la urbon.

La plej fama kampinano estis la maestro Antonio CARLOS GOMES (1836-1896), kies kariero okazis ĉefe en Italio kaj estas konsiderata la plej grava brazila operkomponisto. Li estas aŭtoro i.a. de *Il Guarany*. Oni en 1904 inaŭguris lian tombo-monumenton en la centro de la urbo, tri blokojn for de la kongresejo.

La 41-a Brazila Kongreso okazos en *BI Campinas Centro de Convenções*, altnivela kongresejo en la centro de la urbo, ĉe strato José Paulino, 1369. Ĝi iam estis porknabina lernejo *Sacré-Cœur*, inaŭgurita fine de 1908. Oni konservis la protektitan antaŭan parton kaj konstruis modernajn salonojn en la malantaŭo.



foto: James R. Piton

La Kongreso tie disponos pri la granda aŭditorio (350 sidlokoj), 3 prelegejoj kun 100 sidlokoj, unu ĉambro por kursoj, unu ĉambro por ekzamenoj, salono por la Libroservo de BEL, unu sekretario kaj unu salono kun 80 m² por la infanaj aktivadoj. En la grandaj spacoj inter la salonoj ni havos budojn, babilejon, retkafejon kaj ekspoziciojn.

En la konstruaĵo mem estas restoracio, trinkejo kaj lunĉejo, sed evidente multajn aliajn oni trovos en la ĉirkaŭaĵoj. Kiel integra parto de la malantaŭo estas hotelo de internacia ĉeno, kun rekta ligo al koridoroj de la kongresejo.

Por tiuj, kiuj venos propraŭtomobile, en la parkejo de la konstruaĵo estas subtegmenta spaco por 500 aŭtoj, kaj la organizantoj de la kongreso esperas havi por kongresanoj favoran prezon por la tuttaga restado. Tamen apude kaj en la ĉirkaŭaĵo estas diversaj aliaj privataj parkejoj.

La urba stacidomo situas je 1 kilometro.

Laŭ statistikaj informoj en la oficiala TTT-ejo de la kongreso, la nombro da aliĝintoj (je la 2a de aprilo) superis 300 homojn — el 16 brazilaj ŝtatoj kaj 5 landoj.

Informfonto: www.esperanto.cc/bke



Prezidanto: Prof-ro D-ro David Bianchini
 Vicprezidanto: Prof-ro D-ro José J. Lunazzi
 Sekretario: James Rezende Piton
 Dua Sekretario: Erika Mayumi Cândido
 Kasisto: Eduardo Ramos Dezena
 Dua Kasisto: Ismael Andrade Ávila Mattos

Por bone funkciigi la progamerojn de la kvintaga evento kaj gastame akcepti la vizitontojn, teamo da 14 homoj laboradas jam de preskaŭ du jaroj. Ili formas la Lokan Kongreson Komitaton (LKK), kies aktivado tiel dividiĝas:

Komisiitoj
 hoteloj kaj ekskursoj: Anahi Lunazzi
 komuna loĝejo: Oswaldo Cabral Franco
 giĉetoj: Moisés Braga Ribeiro
 gazetaro: Lucas Yassumura
 fotado kaj video: Norberto Weinlich
 artaj vesperoj kaj aranĝoj: Cristina kaj José Joaquín Lunazzi
 porinfanaj aranĝoj: Ísis Okabe Piton kaj Anita Zimmermann
 junularo: Idílio Cândido Neto

Jen la 26a Brazila Esperantista Junulara Kongreso!

Lernu kunridadi: Esperanto kiel ilo por homa amuziĝo



Alivorte, venas la momento kiun ĉiu engaĝita juna esperantisto en Brazilo sopiras la tutan jaron: nia nemaltrafebla junulara kongreso, okazonta samtempe al la 41a Brazila Kongreso de Esperanto de la 15a ĝis la 19a de Julio 2006 en Campinas. Kiel anoncas la titola parodio al la oficiala temo de la BKE, venu amuziĝi, ridadi, kleriĝi, amindumi, ĝui sukan programon kaj malstreĉan etoson inter intaj kaj ontaj amikoj...

Momenton! Nemaltrafe... KIO?

Ne/mal/traf/eb/a. Enda. Nepra. Tia estos nia 26a BEJK... Kiel kutime, ĝi estos tre danc/ig/a, parol/ig/a, amik/ig/a, ŝvit/ig/a, sed tute ne enua. Enua? Nu, dorm/ig/a. Ĉiuj kiuj jam partoprenis en junulara kongreso povas konfirmi ke *ĉioterapideokazasdumlakongresokajvi nehavastemponeĉpordormikajspiri!!!*

Dum BEJK oni alvenas al la konkludo ke dormobezono estas psikologia. Ĉu vi dubas? Venu do vi mem sperti neforgeseblan semajnon en Esperantujo!

Alia! Alia! Alia!

Kiu ne memoras la amason da fotiloj sur la planko,



atendantan sian vicon registri la junajn vizaĝojn kiuj amike kunridetas kaj krias "alia! alia! alia!" kongresofine jaron post jaro? Venas alia kongreso, alia urbo, alia okazo revidi la konatojn aŭ ekkoni interesajn homojn, kaj refarĉi la animon per verda verovo por la tuta jaro. Tamen vi ne povos manki sur niaj fotoj kaj en niaj rememoroj de la 26a BEJK, ĉar vi ne estas simple alia. Nek la kongreso, kiu estas ĉiam unika...

Programo

Sensacioj ne mankos en la kongreso. Krom la tradiciaj programeroj de la BKE, vi certe gapos antaŭ la lavango da internacivelaj allogaĵoj kiu atendas vin. La junularo aparte hurao ke por la unua fojo prezentos sin en Brazilo la franca kantisto JoMo, unu el niaj plej furoraj surpodiaj artistoj... "Ĉu vi, ĉu vi, ĉu vi... ĉu vi volas danci?" Vi povos tuj rakonti al ĉiuj ke vi estis en lia koncerto, disponigi fotojn, ktp per la kongresa komputilejo! Kaj poste hasti al la lanĉado de Gerda Malaperis – La Filmo!

junularaj prelegoj kaj diskutrondoj konfirmitaj, plia deko survojas, pri la plej diversaj temoj. Nova programero, babiladoj kun la steluloj, debutos ĉi-kongrese: faru tiun tiklan demandon kaj aŭskultu kuriozajn okazaĵojn rekte el la buŝo de la homo malantaŭ la artisto. Por tiuj pli engaĝitaj, seminarioj por aktivuloj pri gravaj temoj de BEJO kaj diskutoj pri nia juna movado. Ĉio tio en bonega kongresejo, kie bele miksiĝas la antikva kaj la moderna, kaj je promena distanco de la hoteloj: ĉiuj povos resti kune dum multe pli da tempo!

Ĉu vi volas gajni vojaĝon al Eŭropo?

Do partoprenu la konkurson BEJO-Ataŝeo! Por tio, vi devas redakti monografion pri la temo "La religiaj baroj", kiun vi devas sendi perletere maksimume ĝis la 17a de Junio 2006 kaj poste voĉe prezenti dum la 26a BEJK. La premio por la plej bona verko estas irrevena bileto al Eŭropo, kie la venkinto povos gastari per Pasporta Servo kaj plenumi kurson de tiu mem elektitan! Kion vi atendas? Aliĝu tuj!

Denove! Denove! Denove!

La organiza komitato ankoraŭ esploras la eblecon venigi aliajn elstarajn stelojn de nia muziko, inter ili kelkaj konataj vizaĝoj de antaŭaj kongresoj. Inter aliaj konfirmotaj programeroj estas sportumado (ĉukpilko!), tuttaga ekskurso al Hopi Hari, unu el la plej grandaj amuzparkoj de Brazilo, kaj kompreneble... la BEJO-Festo!

Novaĵoj kaj informoj aperados en la oficiala blogo de la kongreso, konsultu:

<http://bejk2006.blogspot.com>

La kongreso estos ne nur nemaltrafebla sed same neforgesebla.

Estu bonvenaj al la 26a Brazila Esperantista Junulara Kongreso.

Ni atendas vin!

Infana Kongreseto dum la 41-a BKE en Kampino

En nia landa movado kelkaj familioj parolis kaj parolas en Esperanto al siaj gefiloj tamen la infanoj malfacile fariĝas Esperantistoj en la estonto. Nia brazilaj kongresoj kaj renkontiĝoj ne havas tradicion fari aktivajn por infanoj kaj la movado fariĝas teda por ili. Krom tio, por la gepatroj estas tre malfacile venigi siajn infanojn al loko, en kiu oni ne havas strukturon, lokon por ŝanĝi vindaĵojn, ĉambron por ke la infanoj kuŝu iomete, kuirejon por purigi suĉilon, varmigi lakton aŭ manĝaĵojn ktp...

Ĉijare, dum 41° BKE, oni havos Infanan Kongreseton kun aktivaj tute en Esperanto. La ideo estas venigi la familiojn. Ĝi estos por infano, kiuj parolas esperanton denaske, la nomataj "denaskuloj" kaj ankaŭ lernigi la infanojn, kiuj ne scipovas esperanton, pere de ludoj kaj aktivaj amuzaj kaj plezurigaj. Bona novaĵo estas la nombro de E-denaskuloj, kiuj jam konfirmis la partoprenadon: ĝis nun ni kalkulas je 12 infanoj.

En la skipo, kiu respondecas pri la Infana Kongreseto (IK) en Campinas, ni kalkulas je esperantistaj profesiuloj: Anita Zimmermann, pedagogino en la Hospitalo de Unicamp, kaj Ísis Piton, psikologino kun sperto en infanvartejo, havos la kunlaboron de patrinoj de denaskuloj Marilda Ávila kaj Ariédne Davi. Ni havos gitariston kiu ludos kun ni dum la muzikrondoj. José Roberto

Tenório kaj lia edzino Conceição prezentos pupteatraĵon al la infanoj. Ni zorgos, ke Esperanto-kuracisto, d-ro Floriano Pessoa Filho, deĵoru por la kongreseto — oni havos la okazon konsulti kuraciston en Esperanto kaj senpage. :-)

La celo de la skipo estas proponi al la infanoj amuzajn ludojn ĉiam uzante Esperanton. Ni volas fari el tiu ĉi



kongreso okazajon neforgeseblan por ili. Tiamaniere, oni stimulos la familiojn paroli en esperanto al siaj gefiloj kaj venigi ilin pli ofte al la kongresoj.

Nuntempe ni kontaktas studiojn por havigi aprobon en la esperantigo de infanaj filmoj. Tamen, se tio ne efektiviĝos, ni kalkulas je kelkaj movbildoj por prezenti al la infanoj: Mazi en Gondolando kaj senparolaj filmetoj, kun aldonita parolado por la infanoj. Kaj sekve de tiuj movbildoj ni havos kelkajn aktivajn. Kompreneble,

niaj infanoj ankaŭ ekskursos: ankoraŭ elektigas iu bosko de Campinas en kiu oni pikinikumos kaj alternativaj promenadoj se dum la tago estos pluvo. Ĉiel ajn estos oportuno por praktiki Esperanton.

La Infana Kongreseto havos siajn aktivajn de la 16-a ĝis la 18-a. En la Fermo, la 19-an, la infanoj prezentos artaĵon sur la podio. La regulojn por la IK vi legos en la Kongresa Libro kaj en la kongresa hejmpaĝo:

<http://www.esperanto.cc/bke>

Por ke vi sciu iomete pri la programo de IK: ni havos ludojn por infanoj, kiuj ne nur amuzas sed instruas al ili matematikon, kolorojn, formojn, kunvivadon, kanton, esprimiĝon, memfidon, memestimon. El la tradiciaj brazilaj infanludoj kaj kanzonoj nia skipo jam esperantigis kelkajn, kiel "Sklavoj de Job" (Escravos de Jó), "Mia flava kokido" (Meu pintinho amarelinho), "Rakonto pri serpento" (História da Serpente). Alia allogaĵo, kiu ĉiam ĉarmas al infanoj kaj plenkreskuloj, estas pupteatraĵo. Ĉio okazos en la aparta cxambro de Infana Kongreseto. Ni havos "Dormanguleton" kun matracoj por ripozigi la infanojn, kaj kalkulos je manĝaĵetoj. Ĉio estas farita de patrinoj kaj profesiuloj, kiuj kore laboras por ke infanoj havu spacon en la movado, ke ankaŭ ili ĝuu niajn kongresojn kaj ke estonte ili estu veraj esperantistoj.


Daŭrigo de paĝo 11

tre rarajn filatelaĵojn, kiel la francan poŝtan stampon kiu uziĝis nur dum kelkaj horoj en Universala Kongreso, pro la deklaro de la Unua Mondmilito en la antaŭa tago. Aŭ germanan korespondaĵon cenzuritan de nazioj, kiu montras ke la simpla fakto, ke letero estis verkita en Esperanto, estis sufiĉa kialo por resendi la leteron al la verkinto. Aŭ ankoraŭ kiel Esperanto estis aplikata por ekhavi informojn pri homoj apartigitaj de la militoj."

Laste, kiel tria parto de la festa semajno, estis malfermitaj novaj kursoj de Esperanto en Unicamp, je du niveloj, sub respondeco de membroj de la studenta grupo, kun sume 40 lernantoj en kvar klasoj. Harlen Batagelo kaj Ricardo Dias Almeida gvidas enkondukajn (ekspresajn) kursojn de kvin lecionoj, cele al informado kaj motivigo, dum James Vasco Milanez kaj Lucas Vignoli Reis gvidas bazajn kursojn de dek du lecionoj, kiuj

prezentas pli detale la lingvon. Jam de tri jaroj regule okazas kursoj en Unicamp; temas pri neoficialaj kursoj, tamen kun formala permeso pri uzo de la ĉambroj. Tri novaj klasoj de ekspresaj kursoj estos malfermitaj en Majo.

Eĉse jam finiĝis Semajno Suda Stelaro, vi ankoraŭ havas ŝancon partopreni la festadon: venu al la 41a Brazila Kongreso de Esperanto, en Julio, kaj ĝuu bonegan kongreson, plia omaĝo de la esperantistoj de Campinas al niaj pioniroj.



DESTINO

Cecília Meireles
traduko de Sylla Chaves

Paŝtistin' de nuboj, mi estis dungita
de tiel senŝirma kaj vasta bieno,
ke en ĝi ne estas komenco nek fino,
kaj mankas vespero, kaj mankas mateno.

(Paŝtistoj de l' tero, vi trovos en suno
certecon pri tempo, pri voj', pozici'.
Vi konas fruecon kaj konas malfruon.
Ne mi.)

Paŝtistin' de nuboj, mi iun klarigon
pri l' ŝanĝanta grego atendadas vane.
Tra l' eben' aera mi perdite iras,
eble kondukante, eble akompane.

(Paŝtistoj de l' tero, vin certe ne devas
pri miaj problemoj atingi konsci'.
Vi kredas je firmo, je limoj vi kredas.
Ne mi.)

Paŝtistin' de nuboj, mian tutan gregon,
per divers' iriza, lumradi' koloras,
kaj de ĉiuj flankoj disblovas la vento
la lanon de l' ŝafoj, kiuj dise foras.

(Paŝtistoj de l' tero, kun trafaj okuloj,
estas tre trankvila via profesi'!
Povas vi atingi ombron en forfuĝo...
Ne mi.)

Paŝtistin' de nuboj, mi ne povas dormi
en kampar' sinmovi sen nokto aŭ tago.
La ŝpruco de steloj kaj lunoj ensorĉas
miajn ŝafojn misajn en perdita vago.

(Paŝtistoj de l' tero, sub dolĉa ŝirmilo
de freŝa verdaĵo, vi scias en ĝi
malkovri la neston de dorma trankvilo.
Ne mi.)

Paŝtistin' de nuboj, en kamparo mia
la vizaĝon mastran mi ne plu rekonas.
Kaj mi foje sentas, ke min serĉas iu...
mi ne scias kie... mia nomo sonas.

(Paŝtistoj de l' tero, vi povas renkonti
personojn realajn, ne de fantazi';
povas konatiĝi kaj interparoli...
Ne mi.)

Paŝtistin' de nuboj, kun vizaĝ' dezerta
iras mi post tiuj formoj iluziaj,
en maldormo brula tra l' eben' eterna,
kiu turniĝadas sub piedoj miaj.

(Paŝtistoj de l' tero, salajron vi trovos,
kaj dancos en baloj, kun kora pasi'.
Vi ekdormos iam, kiel mildaj ŝtonoj.
Ne mi.)

El la pasinto, tutkore


Skeptikuloj ofte pretendas, ke al Esperanto mankas kulturo. Tamen kiam mi ekrlatis al Esperanto en 1988, mi tuj enamiĝis al ĝia historio. Ne nur pro la studo de la grandaj mejloŝtonoj en la vivo de Esperanto, sed ankaŭ pro tiu ethistorio, kiun faris pioniraj idealistoj, kun siaj etaj venkoj, duonsukcesoj, grandaj elreviĝoj, profundaj koraj rilatoj, perfidoj, foje eĉ personaj tragedioj. Tio estas laŭ mi la granda distinga trajto inter Esperanto kaj aliaj planlingvoj. Ni ne nur havas pasintecon, sed hodiaŭ oni plene konscias pri la memoro pri tiuj homoj, kiel kolonoj de la hodiaŭa movado. Ni rigardas al iliaj ekzemploj (aŭ devus rigardi, por eviti laŭokaze ripeti kelkajn erarojn). Ni ofte aludas al nomoj, faktoj, verkoj komune signifoplenaj. Do nia nuna vivanta movado havas tre solidan kulturalan bazon.

La E-bildkartoj de pli ol 100 jaroj estas specimenoj de tiu kulturo, kun siaj referencoj al niaj institucioj, kleruloj, ordinaruloj, tradicioj, maniero alrigardi la mondon kaj ankaŭ esperoj.

Mi okupiĝas nun pri la ellaboro de ekspoziciaĵo "El la pasinto, tutkore", kiu debutos en la 41-a BKE en Julio. Ĝi konsistos el E-bildkartoj de 1900 ĝis ĉ. 1939, ĉar tiama eksplodo de la Dua Mondmilito markis plian fazon de la E-historio. En BE mi prezentos du specimenojn de tiaj E-bildkartoj, kun komentoj pri E-historio.

El la nuntempo, tutkore,

James Rezende Piton



BRAZILAJ KLUBOJ EN 1907

La jaro 1906 estis brila ekĝermo por nia organizita brazila movado. Post la fondiĝo de Suda Stelaro en la 17-a de Marto, Junio vidis la naskiĝon de la Brazila Klubo en Rio, poste E-Societo de Porto Alegre, grupo en Niterói kaj alia grupo en Rio. Ili montriĝas kun siaj adresoj en poŝtkarto eldonita de la Brazila Klubo. Tiun ĉi ekzempleron sendis en 1907 la klubprezidanto Everardo Backheuser al Preso Societo en Parizo, por mendi librojn.

KUNFRATIĜO DE NACIOJ

Tiu ĉi estas unu el la plej malnovaj E-kartoj, kiujn mi konas. Ĝi uziĝis jam en 1902 kaj montras scenon de kluba teatraĵo en Brno, Ĉeĥujo, kun unu el niaj plej ŝatataj alegorioj — tiu de diversaj nacioj en harmonia interrilatado.



Rudolfs Libeks: la unua esperantisto loĝinta en Brazilo

En 1907 omaĝe al la centjariĝo de Brazila E-Ligo, oni lanĉos libron, redaktatan de d-ro Osvaldo Pires de Holanda, kiu rakontos la historion de E-movado nialande. El la multaj temoj, ekz. literaturo, instruado, varbado — traktataj en tiu verko, mi interesiĝas precipe pri tiuj rilataj al la E-agado kaj vivo de la pioniroj.

Ĉu en Brazilo li kabeis?

La unua esperantisto kiu loĝis en Brazilo estis s-ro Rudolfs G. Libeks. Li naskiĝis la 5-an de marto 1854, en bieno Prauliena, paroĥo Lazdona, Latvio. Li estis instruisto kaj aŭtodidakte studis filozofion, sociologion, teologion, konstruadoinĝenierion, ekonomikon kaj aliajn sciencajn fakojn. Liaj poemoj, rakontoj, recenzoj, artikoloj aperis en gazetoj kaj libroj¹. En Brazilo li laboris kiel instruisto, termezuristo, skribis artikolojn por latvalingvaj periodaĵoj, estris kolonion kaj ellaboris projekton celantan la plibonigadon de la latvaj enmigrintoj^{1,2}.

Libeks estis komisiita kaj de latva registara organizaĵo kaj de gazeteldonistoj por esplori la vivkondiĉojn de latvoj enmigrintaj Brazilon^{1,2}. Serĉante la plej konvenajn klimaton, grundon, ekonomiajn perspektivojn kaj negocajn eblecojn, li vizitis Sankt-katarinon (sudbrazilan ŝtaton), Argentinon kaj Ĉilion^{1,2,3}, sed estis ĉefe en Minasĝeraĵso kaj San-paŭlo (sudorientaj brazilaj ŝtatoj) kie li loĝis kaj plenumis siajn taskojn. Artikoloj, leteroj, raportoĵoj tion atestas.

Li estas la pioniro de E-o en Latvio: li skribis artikolojn, gvidis kursojn kaj, en ĉefurbo Riga, la jaron 1889 lanĉis la unuan lernolibron de la Internacia Lingvo por siaj samlandanoj^{1,2,4}. Ĉar Zamenhof eldonis la unuan E-lernilon en 1887⁵, do, tio montras kiom frue Libeks sin dediĉis al nia grandvalora afero.

Li alvenis nian landon la jaron 1890 — dokumento kiu pruvas tiun fakton

estas letero⁶ (publikigita en la ĵurnalo Baltijas Vestnesis, 25.okt.1890^{1,2}), kiun R. Libeks sendis, el urbo Rio-de-ĵanejro, al sia frato Viktor tiam loĝanta en Latvio. S-ino Saulcerite Neilande skribis interesan artikolon¹ pri la vivo de R. Libeks en Latvio, sed rilate liajn jarojn en Brazilo ŝi scias nenion koncernantan al E-agado, escepte de tio, kion li asertas en artikolo de la ĵurnalo Baltijas Vestnesis, 30.apr.1891 (kiam li estis loĝanta en Brazilo): "...tataroj, japanoj, brazilanoj kaj aliaj popoloj lernas Esperanton..."⁷. Bedaŭrinde en tiu teksto li ne mencias librotitolojn, kursojn, adresojn rilatajn al tiu lernado.



Pro historiaj kialoj kaj pro respekto al niaj admindaj antaŭuloj, ni juĝas farinda laboro detalan serĉadon por malkovri se li partoprenis nialandan movadon. Konsiderante ĉion, kion li realigis en Latvio, ĉu estas eble ke li, alveninte la Novan Mondon, absolute forlasis la E-agadon? Jen respondindaj demandoj: Ĉu li aliĝis al iu E-grupo de ŝtatoj Minasĝeraĵso, Rio-de-ĵanejro aŭ San-paŭlo? Ĉu li gvidis E-kurson en iu brazila urbo? Ĉu li prelegis pri E-o ie en nia lando? Ĉu li publikigis artikolon portugallingvan pri E-o aŭ Esperantan pri iu ajn temo en brazila ĵurnalo, gazeto aŭ libro?

Miaopinie konsulti la ĉi-sube indikitajn informfontojn tutcerte kondukos nin al la dezirata solvo. Jen ili: a) libroj: biografiaj, historiaj, literaturaj, alitemaj; b) almanakoj, jarlibroj, enciklopedioj; c) bultenoj, raportoĵoj, ĵurnaloj, gazetoj kaj tag-, kontrol-, registrad-libroj/ kajeroj de E-asocioj;

d) listo de gazet-abonantoj kaj de kongres-aliĝintoj; e) leteroj kaj manuskriptoj diversaj; f) pasportoĵoj, vojaĝbiletoj.

Rimarko: Inundo atinginta urbon Lavras detruis pentraĵojn, fotojn, eldonaĵojn, dokumentojn kaj aliajn aĵojn de lia privata biblioteko⁷. Ĉu pro tiu hazardo lia idaro havas nenan dokumenton pri la E-aktivado de R. Libeks nialande? Estas aldoninde ke la du gefiloj — Dailite kaj Tautmilis, jam mortis, kaj ke liaj nepoj kaj pranepoj ne parolas, nek legas la latvan aŭ E-on⁸.

S-ro Luiz T. da Silva⁷ asertas ke R. Libeks, antaŭ ol ekloĝi en urbo Lavras, estis vivinta en Venezuelo kaj tie estis farinta botanikajn studojn, tamen lia letero ne donas pliajn informojn. Ĉar latvaj esperantistoj planas redakti senmankan biografion, ili deziregas akiri dokumentojn kiuj traktas tiun eblan estadon. Mi kredas ke la cirkonstancoj favoras al la venezuelanoj la klarigadon de tiu punkto.

En Brazilo R. Libeks loĝis en:

— ŝtato Minasĝeraĵso: a) tutcerte en urbo Lavras^{1,9}, kie li en 1892 edziĝis al brazilanino^{1,2,10}; b) iom da tempo en urbeto Formiga^{2,4,10}, kaj urbo Juiz de Fora¹⁰;

— ŝtato San-paŭlo: a) iom da tempo en kolonio Nova Europa^{1,2,10} (ĉu politike/leĝe apartenanta al kiu urbo?), kie vivis latvaj enmigrintoj; b) iom da tempo eble en kolonio Varpa⁹ (ĉu politike/ leĝe apartenanta al kiu urbo, ĉu Tupã?);

c) iom da tempo eble en vilaĝo am kolonio Nova Odessa³ (en kiu ŝtato, ĉu San-paŭlo?);

Pro lia ofico rilate la enmigrintojn, Libeks ofte vojaĝis Rio-de-ĵanejron, kie li subite mortis la 14-an/ nov./ 1908^{2,3}.

Tial ni pensas ke tekstoj skribitaj, publikigitaj inter la jaroj 1889 kaj 1910, en la ŝtatoj Minasĝeraĵso, Rio-de-ĵanejro kaj San-paŭlo havas plej multe da ŝancoj por klarigi la biografion de tiu speciala sinjoro.

Estas forte rekomendinde aldoni kompletajn, precizajn referencojn pri la legitaj dokumentoj, eldonaĵoj. Se ni faros tiele, la legontoj kaj ontaj generacioj varme dankegos nin.

Tri jarojn poste alvenis la dua pioniro

Francisko Valdomiro Lorenz (ĉeflingve: František Vladmír Lorenc) naskiĝis¹¹ la 24-an/dec./1872 en vilaĝo Zbyslav, apud urbo Čáslav (Ĉeĥio), kaj mortis^{12,13} la jaron 1957 en ĉefurbo Porto Alegre, ŝtato Rio Grande do Sul (Brazilo). Donitaĵoj¹¹ koncernantaj la vivon de tiu aktivemulo en ĉefiaj urboj kaj vilaĝoj estos prezentataj je la formo de listo por ke oni facile komprenu la eventosinsekvojn kaj povu ilin kompari kun tiuj ligitaj al R. Libeks.

— la jarojn 1888-1890, en urbeto Kolín, li vizitis la 5-an kaj 6-an klasojn. Ĉi-lastan li ne finis kaj ankoraŭ 1890 li transloĝiĝis al ĉefurbo Prago kie li komencis skribi artikolojn por Omladina, gazeto kies tekstoj esprimis sociajn, politikajn, ekonomiajn ŝanĝojn kiuj estis absolute rifuzitaj de la reganta Aŭstria-Hungaria monarĥio;

— Li estas la pioniro de E-o en sia naskiĝlando: la jaron 1890 li eldonis, en urbo Pardubice, la unuan E-lernolibron por ĉeĥoj;

— en 1891 li instruis E-on en la duetaĝa gastej-domo U Pštrosu, strato Pštrosova n-ro 189/16, Prago;

— 28/set./1891 li aktive partoprenis kunvenon de laborista junularo okazintan en urbo Kladno. La lastajn monatojn de tiu jaro li fariĝis oficiala redaktisto de la gazeto Omladina (Kladno kaj Prago);

—dec./1892 li eldonis la dusemajnan gazeton Pokrok, en urbeto Mladá Boleslav;

— mar./1893, denove li eldonas la gazeton Omladina;

— Krom skribi, respondeci pri la du supre menciitaj periodaĵoj, organoj de progresema, socialdemokrata junularo, li kontribuis ankaŭ al Nové Proudy, Rozhledy kaj aliaj gazetoj;

—18/jun./1893: en Prago, ĉe la tombejo Olšany, pro lia partopreno en socialdemokrata manifestacio postu-lanta balot-raĵton, li estis kaptita kaj arestita;

— la registaro liberigis lin la 13-an/set./1893. Ankoraŭ tiumonate li fuĝis Brazilon.

La celo de ĉi tiu ‘ĉapitro’ estas pruvi ke li ne forveturis el Eŭropo antaŭ la jaro 1890 (ni ĵus konstatis ke ĝis 1893 li tie loĝis), kaj por ĉiuj, kiuj volas legi pri la vasta bibliografio de tiu eminenta poligloto, tradukisto kaj verkisto, mi sugestas la jenan retpaĝaron:

http://eo.wikipedia.org/wiki/Francisko_Valdomiro_LORENZ

Pro ĉio supre dirita estas evidente ke nur post ĝisfunda esplorado ni akirus datumojn por finfine scii se la pioniro de E-movado en Latvio agadis, aŭ ne, por la pligrandigo de nia nobla idealo ankaŭ en tiu ĉi parto de Sudameriko. Lia biografio estas sendube kompletigenda, kaj la sukcesa rezulto dependos de nia strebado.

Se iu esperantisto havas liberan tempon por dediĉi al tiu grava parto de la historio de E-movado en Brazilo, bonvolu kontakti min letere aŭ retroŝte.


Tabelo kiu resumas kelkajn fundamentajn datumojn pri niaj esperantistoj-pioniroj:

Homoj kaj faroj	Jaro		
Libeks eldonas la unuan E-lernolibron por latvoj	1889		
Lorenz eldonas la unuan E-lernolibron por ĉeĥoj		1890	
Libeks alvenas Brazilon		1890	
Lorenz alvenas Brazilon			1893
F. V. Lorenz ekloĝis en ŝtato Rio Grande do Sul (Brazilo)			1894 (08.aŭg) ¹⁴
Unua(?) priesperanta, sed germanlingva, artikolo eldonita en Brazilo	1894 ¹⁵	aŭtoro: Arno Philipp	Periodaĵo: ??
Dua(?) priesperanta artikolo eldonita en Brazilo, kaj la unua(?) portugallingva	1906 ¹⁵ (dec.)	aŭtoro: Hernani Mendes	Periodaĵo: Renascença
La brazilanoj Baggi de Araújo, kaj, F. P. Machado Reis, kaj la enmigrinto (naskita en Germanio) Arno Philipp* lernas E-on			1897 ¹⁵

*Ĉu li lernis E-on per portugala- aŭ germanlingvaj libroj?

Referencoj: (1) Neilande, Saulcerite — Rudolfs Libeks (1854-1908) kaj la Unua Libro por latvoj, ĉapitro (paĝoj 245-253) de la verko “Menade bal pük bal – Festlibro por Reinhard Haupenthal”, diversaj aŭtoroj, Saarbrücken: Edition Iltis, 1998. 487p.; (2) Burgmeister, Mirdza — Rudolfs Libeks – la unua esperantisto en Latvio kaj Brazilo. Heroldo de Esperanto, n-ro 1690, 14/dec/1981; (3) Malwesa, J. — nekrologo kaj biografieto pri R. Libeks publikigita la 25-an.nov.1908 en Lihdumneek, latvalingva ĵurnalo eldonita en ĉefurbo San-paŭlo; (4) Zigmunde, Alida — Esperanto en Latvio (1889-1960). Teksto de la kongres-libro de BET-38, aranĝita en Riga (Latvio), 2002. El la Interreto: http://www.aliaflanko.de/latvio/LE/BET38_1.php, dato: 20.set.2004; (5) Zamenhof, L. L. — Fundamento de Esperanto, Pisa: Edestudio, 1991, 356p., paĝo 10; (6) Neilande, Saulcerite — letero, ĉefurbo Riga: 07.dec.2001; (7) Silva, Luiz Teixeira da — artikolo/ letero, urbo Lavras: ne datita; (8) Neilande, Saulcerite — Rudolfs Libeks. Latvia Esperantisto, n-ro 28, feb./1997, paĝo 5; (9) Silva, Luiz Teixeira da — letero, urbo Lavras: 15.okt.2001; (10) Cicarelli, Eduardo — Rudolf Gustavo Libeks, o homem que a Letônia não esqueceu. Órgão Oficial do Município de Lavras, 13-19/nov./1995, página 3; (11) Kamarýt, Stanislav — Historio de la Esperanto-movado en Ĉe%oslovakio – iom da historio kaj iom da rememoroj. Praha: Ĉeĥa E-Asocio, 1983, 252+4p., paĝoj 13-19; (12) gazeto Brazila Esperantisto, n-ro 314, feb./2001, paĝo 16; (13) Kongreslibro de la 66-a UK, Braziljo, 1981. En la ĉapitro ‘Nomoj de la salonoj’, paĝo 60. Tiu biografieto tekstas: “...ŝajne, la dua tiea (t.e., en Brazilo) esperantisto – post alia enmigrinto la latvo R. Libeks, kiu alvenis en 1890”; (14) Sanguinetti, Ivo — letero, ĉefurbo Porto Alegre (ŝtato Rio Grande do Sul): 08.nov.2001; (15) Zamenhof, L. L., Braga, Ismael Gomes, kaj, Coutinho A. Caetano — Esperanto-Modelo. Rio de Janeiro: Federação Espírita Brasileira, 1938/1991, 222p., paĝoj 5,6;

Efikeco de entreprena komunikado



Ĵusnaskita bebo estis trovita ĉe pordo de entrepreno frumatene. Eksciinte pri la okazintaĵo, la direktoro diskonigis la jenan internan komunikon:

De: Direktoro
Al: Personala Departemento

Ni konfirmas la ricevon de ĵusnaskito je nekonata deveno. Starigu komisionon por esplori:

- a) ĉu la ĵusnaskito estas interna produkto de la entrepreno;
- b) ĉu la afero koncernas al iu funkciulo;

Post unu monato da esplorado, la komisiono sendis al la direktoro jenan mesaĝon:

De: Esplokomisiono
Al: S-ro Direktoro


Post kvar semajnoj da esplorado ni konkludas, ke la bebo **NE POVAS ESTI PRODUKTO DE TIU ĈI ENTREPRENO** pro jenaj kialoj:

- a) neniam en nia entrepreno io estis farita kun plezuro kaj amo;
- b) neniam en nia entrepreno du personoj tiel intime reciprokis kunlaboradon;
- c) neniam tie ĉi io estis tiel perfekte produktita;
- ĉ) neniam en nia entrepreno io ajn estis finpretigita en naŭ nomatoj.

(Tradukita kaj adaptita el revuo Exame)

Ekas Aŭtuno

Zaĉjo



Osmar Silva Alves

Nikelo Naŭzo



Fernando Gonsales

Migrado de libroj



Migrado de birdoj ĉiam estis(as) bela okazaĵo ĉie ajn sur
nia terglobo. Nun, ĝi pli kaj pli kreas zorgojn ĉe homoj
pro kialoj, kiujn ĉiuj el ni sufiĉe bone aŭ malbone konas.

En Esperantujo ni delonge konas alian migradon: tra nia
ĉielo daŭre flugas libroj. Tiujn flugojn afrikanoj ĝoje
bonvenigas. La librotrafiko estas tute densa; ĝi libere trovas
sian vojon al ĉiaj direktoj. Flugas libroj de Bruselo al
Togolando, de Britujo al Suda Afriko, de Roterdamo al
Tunizio, de Japanujo al Kongo, de Aŭstrujo al Niĝerio, de
Brazilo al Burundio... kaj pli kaj pli lastatempe al Benino.


Tie ili atingas la Afrikan Oficejon de UEA, kiu okupiĝas pri
plusendo al grupoj kaj unuopuloj kiuj sendas petojn al tiu
oficejo. Temas pri lernolibroj kaj legolibroj por komencantoj
kaj progresintoj, por infanoj kaj plenkreskuloj.
Niaj flugoj ne dependas de sezonoj: ili eblas tra la tuta jaro!

Viajn sendojn do eblas ĉiam direkti al:

Afrika Oficejo de UEA
BP 416
Lokossa-Mono
Respubliko Benino/République du Bénin
tel: +229 22 41 02 29
Retadreso: afrika.oficejo@uea.org

Vi povas legi pri materialo bezonata ĉe:
www.tejo.org/uea/petataj_libroj

Informis: Jean Codjo
bcodjo@nb.sympatico.ca



“Não Há Ideologia
Superior
à Solidariedade”

UNIÃO PLANETÁRIA

Criando novos paradigmas na televisão brasileira,
a qualidade UP se apresenta em 56 transmissoras,
46 cidades, sendo 18 capitais.

Confira a programação
de sua cidade
Em nosso site:

www.uniaoplanetaria.org.br

Informações:
(61) 3368-2204 / 0800 644-8484

Assista as séries:

A Construção da Paz Mundial, Arte - Caminho do Despertar, Descobrimo o Yoga, Em Buca do Autoconhecimento, Entre Amigos: Conversando com o Mundo, Esperanto - Instrumento de uma Globalização Solidária, Ética e Sustentabilidade, Idéia Musical, e outras.